Österreichische
Nationalbibliothek

Esther': triakta tragedio : kun takta teksto de la 'Horoj, alkonformigita al muzikverkoj de Moreau kaj Chaulieu

Noël

Nancy; FRA 1906

Signatur: 700559-A.Esp-1.eld.

Barcode: +Z81960908

Zitierlink: http://data.onb.ac.at/rep/1001A702

Umfang: Bild 1 - 96

Nutzungsbedingungen
Die Österreichische Nationalbibliothek macht an diesen Inhalten kein eigenes urheberrechtliches Verwertungsrecht geltend. Sie erklärt sich insofern auch mit einer Nachnutzung dieser Inhalte in der abrufbaren Qualität ausdrücklich einverstanden. Dies gilt auch für die Verwendung dieser Inhalte in Online-Foren, Blogs und in Social-Media-Kanälen wie Facebook, Instagram, Pinterest etc.. Unabhängig davon sind allenfalls bestehende Rechte Dritter an den Inhalten vor jeglicher Nachnutzung vom Verwender individuell zu klären.

Bei einer Nutzung unserer Inhalte ersuchen wir um die Angabe eines Bildnachweises (Titel, Datierung und weitere verfügbare Beschreibungen) und um eine Quellenangabe (Zitierlink aus [Portal] und der Verweis "[Portal]/Österreichische Nationalbibliothek"). Für Postings auf Facebook oder Instagram ersuchen wir um Verlinkung des entsprechenden Accounts der Österreichischen Nationalbibliothek.



ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

700559-A

1. Cl. Esp-

ÖNB
+Z81960908

J. RACINE.

S. P. E.

ESTHER'

Triakta tragedio

TRADUKITA DE Dro NOËL

Vic prezidanto de Nancy'a Grupo

Kun takta teksto de la 'Horoj, alkonformigita al muzikverkoj de Moreau kaj Chaulieu

MANUSKRIPTO DE LA AŬTORO

PREZO : 1 FR. 25

Por propagando de Esperanto

1906

701704-A

700559-A

Al S^ro Emile Boirac
Rektoro de la Dijon'a Universitato.

Profundrespekte dediĉis
Dr Noël.

Esthero.

tragedio de Racine

trad. Dr Noël.

Personoj.

—

Asuero — Reĝo de Persujo.
Esthero — Reĝino de Persujo. (Esthenjo).
Mardoko — Onklo de Esthero.
Amano — Ministro de Asuero.
Zarso — Edzino de Amano. (Zanjo).
Hidaspo, Asafo } oficiroj.
Lizo — Amikino de Esthero (Linjo).
Thamaro.

Gvardiistoj de Reĝo Asuero.
Ĥoro de hebreaj junulinoj.

La agado havas lokon en Suso, en palaco de Asuero.

„Kompato" deklamas antaŭparolon.

—

Antaŭparolo

Komprato.

Jen mi, el felica ŝi dejo de Dio
Alvenas en ŝiun Sanktejon de Bono.
Kun mi, Senkulpeco, fratino fidela.
Nenie ni trovas ŝirmejon pli certan.
Ĉi tie, for bruo, al plej santotaj Klopodoj
Popol' naskiganta de mi instruigas;
En ĝian animon mi ŝutas bonsemon
De virtoj, per kiuj ĝi Mondon sanktigos;
Ĉar Reĝo bonfara, Regnostro potenca,
Al mi komisiis multkarajn objektojn,
Ĉi tien kunigis tiumajn knabinojn,
Sen helpo, sen gvido disaportigitajn;
Proksime de Trono konstruis palacon
Por doni al ili Felicon kaj Pacon.

Grand'Dio, memoru pri tia bonfaro;
Ke liaj Klopodoj, por Vin pli glorezi,
De Vi enskribiĝu en Libron, sur kiun
Kuŝigas Vi nomojn de reĝoj amataj.
Vi aŭdas min, mian elvoĉon Vi konas;
Mi estas „Kompato". — l'amata filino
Prezentas plej dolĉajn sopirojn de l'Reĝo.
Je amo al Vi, lin mi tute plenigas,
De lia fervor' al Vi, varma fajreco
Vastiĝas tra Mondo, de loko al loko.
Vi vidas lin, antaŭ Vi, ĉiam humila,
Ĉe Vi malaltigi la frunton plej gloran,
Per nobla ekzempl' fierulojn hontigi,
Respekte sin klini ĉe sojlo de Temploj.
Por Via Plejgloro li sola el Reĝoj
Sin armas, batalas por Vi, por Dirajtoj.
Perfida profito kaj blinda ĵaluzo
Kuniĝas por al Vi hereze ribeli;
Malpaco plenregas sur ĉiuj kaj ĉio
Ekŝajnas forkuri de sanktaj standardoj.

Infer', per mallumo tutmon de funebra
Blindigis okulojn de homoj plej sanktaj!
Li sola, neŝanĝa, konfida je kredo,
Ne serĉas, rigardas, aŭskultas se ne Vin;
Mokridas senpovan diablan kaptilon,
Kaj de l'religio protektas Majeston.
Grand'Dio, rajtigu Vin Mem, kaj hodiaŭ
Vi helpu lin, kiel Vi helpis jam, kiam
Vi, kiom da fojoj, sur Rejno, forpelis
Al li malamikajn fremdulajn anarojn.
Ĉi tiujn densve mi vidas fiere
Sin ĵeti ankoraŭ al samaj rifaroj.
Jam ili, rompinte plej firmajn barilojn,
Per ruboj kastelaj surkovras landlimojn.
Favoris Vi al li per filo plej helpa
Por plaĉi, batali, obei, komandi.
La filo, li ankaŭ, senhalte venkanto,
Ekŝajnas nur celi al amo de l'patro.
La fil', obeema al liaj deziroj,
Senĉese timiga al la malamikoj,

Similas al Viaj anĝeloj venĝantoj.
Laŭ lia ordono fiere li Kuras;
Li ĉie militas per gloraj armiloj,
Kaj ilin, post venko, redonas al patro.
Sed Kiam grandReĝ' por mi tiel batalas,
Vi, Kiuj dolĉege nun ĝojas ĉi tie,
Se iom ripozi heroo Konsentos,
Lin voku al viaj senkulpaj ludaĵoj;
Parolu pri glora faraĵ' de Esthero
Pri Kredo venkinta sur malpiegeco.
Kaj vi, se vin ĉarmas nur vantaj pasioj
En Koro vekitaj de vanaj pensaĵoj,
Aŭ ankaŭ de malseriozaj vidaĵoj,
Se tedas vin sono de miaj paroloj
Tuj iru for de mi, pro sankta graveco
De miaj plezuroj. Ĉi tie, ĉiaĵo
Parolas pri Dio, pri Paco, pri Vero.

Esthero

Akto I

Teatro figuras Reĝinon de Esthero

Sceno 1

Esthero - Lizo -

Esthero Vi?.. Linjo!.. Ho tago trifoje (oble) felica!
Mi dankas cielon, car mi vin revidas!
Vi, kiel mi en Benjameno naskita,
Dum mia junec' amikino cianna,
De sama dolora sklavaco premita,
Sopiris kun mi pri Sion' malfelica!...
Mi tiun epokon tutkore memoras ...
Sed, cu vi ne sciis pri glor' de Esthenjo?...
Mi vin de pli ol ses monatoj serĉigas....
En kia klimato, dezert' vi vin kaŝis?..

Lizo Mi aŭdis pri via mortigo!.. Mi plorис ...
Kaj, apartiginta el ĉiuj mortemaj,
Atendis finigon de vivo malĝoja ...
Sed dia profeto, Reĝin', al mi diris:

6 „Tro longe vi ploras pri morto malvera!
„Vin levu kaj sekvu irejon al Suso,
„Vi vidos Estheron kun gloro, honoroj.
„Sopiras vi pri ŝi!... ŝi sidas sur Trono.
„Konsolu – li diris – la gentojn malĝojajn,
„Sionon; ĉar baldaŭ la Di' de bataloj
„Elmontros potencan kunhelpon, kaj krio
„De sia popolo ĝis li suprenflugis!...
Li diris. – Pro tio mi, ĝoja, konfida,
Alkuras. En vian palacon mi venis.
Ho miro! Triumf' admirinda nun por mi!
Efik' de Potenco savinta Prapatrojn!
Fier' Asuero ĵus kronis sklavinon,
Obeas kozalta Persan' hebreinon.
Per kiaj rimedoj, sekretaj periloj,
Ĉielo alportis ĉi tiun miraĵon?
Esthero Vi eble sciiĝis pri fama defalo
De l'antaŭulino, fiera Vasthio.
Jen: Reĝo pro ŝia kondut' ofendiĝis,
Kaj li ŝin forpelis de l'tron' kaj palaco,

Sed ĉiam li pensis pri ŝi, Kaj longtempe
Vasthis regadis sur Kora malgaja.
Li do elserĉigis, tra siaj multregnoj,
Pri nova edziniĝ por forigi malĝojon.
De landoj Induj', Hellespont', Egiptujo,
De landoj de Parth' Kaj de Scito soraĝa,
Senditoj Konduktis al Suso filinojn,
Por sceptri promesata nur al la plej bela ...
Vivadis mi, tiam Kaŝata Kaj sola,
Per zorgoj atentaj de saĝa Mardoko.
Vi scias, Ke al li multege mi ŝuldas.
Ĉar morto forrabis al mi la gepatrojn,
Li vidis en mi nur filinon de l' frato,
Kaj li anstataŭis patrinon Kaj patron.
Pri l' sort' de mizeraj Hebreoj, li, ĉiam
Malĝoja, min tiris el nekonateco,
Kaj sur min malfortan fondante l' esperon
Por savo, instigis min peti la sceptron.
Kun tremno, plenumis mi liajn projektojn;
Mi venis, sed mutis pri muso, pri lando.

Mi nun ne parolos pri ĉiuj jaluzoj
De Ţia amaso da Konkurantinoj,
Serĉantaj, sur frunton de Reĝ' Asuero,
Eklegi decidon por Ţia elekto.
Jen ĉiu klopodas kaj sin valorigas,
Jen unu sin gloras pro sango nobela,
Alia, por sin plibeligi, prezentas
Aldonon de arta plej lerta laboro.
Mi, Kiel perilo kaj sola rimedo,
Oferis al Dio nur miajn ploregojn!
Ordonis al mi Asuero: ĉesti.
Aliris mi, Linjo, al Reĝo fiera.
Ha! Dio potenca Komandas al Reĝoj!
Li donas sukceson al Koroj senkulpaj,
Kaj Li ekrevigas fierajn. – Ţuj Reĝo
Admiris pro miaj modestaj logajoj,
Kaj min observadis longtempe, silente.
Sendube, Ĉielo, por mi favoraga,
Dum tiu ĉi tempo lin puŝis al amo.
Li fine, kun granda dolĉeco rigardis,

I. 1

Kaj diris: Vi estu Reĝino !... Samtempe
Li mem min Kaprestris per propra ordrono.
Poz montri pri sia felico Kaj ĝojo,
Li multe donacis al Kortegularo;
Kaj eĉ, malavare, en ĉiuj provincoj,
Invitis popolon al reĝa edziĝo.
Dum tiuj ĉi tagoj de ĝojaj festenoj,
Ve, kiom mi kaŝis doloron kaj honton!
Esthero - mi diris - Esthero nun reĝas,
Duono de l'tero al ŝi submetiĝis ...
Kaj Jerusalemo sub herbo silentas!
Siono hontege koŝigas rampulojn!
De Templo plej sankta Kolonoj subkuŝas!
De Di' Israela glorfestoj nun ĉesis!...

Lizo — Ĉu vi ne konfidis Kun Reĝo pri tiaj ...?

Esthero — Ne! Ĝis nun ne sciis li kia mi estas..
Ĉar tiu per kiu ĉiela min gvidas
Ordonas silenti pri tiu sekreto.

Lizo — Mardoke?... Ĉu povas li veni ĉi tien?

Esthero — Pro lia favor' al mi, alturnijorna,

I.1

Li, kvankam ne tie ĉi, scias konsili,
Ĉu povus bariloj haltigi respondojn?
Ne pli ol li, patro elzorgas pri filo;
Kaj eĉ jam, pro liaj sekretaj avertoj,
Al Reĝo malkovris mi krimajn projektojn
De du malbonuloj al li minacantaj.
Mi tamen, pro amo al nia nacio,
Venigis ĉi tien Sionajn filinojn,
Similajn al floroj junkreskaj, malfortaj,
Sub fremdan ĉielon kun mi forpŝenitajn.
Kaŝate, for ĉiu malpie ĉeesto,
Mi ilin edukas kun zorgo kaj amo.
Ĉi tie, for gloro de krono, kaj laca
Je vantaj honoroj, mi mem min serĉante,
Al Dio Eterna mi genufleksadas,
Kaj ĝuas pro ĝojo pri mi forgesigi.
Sed rason ilian mi kaŝas al ĉiuj ...
Mi ilin alvoku .... He! Venu, filinoj,
Vi, jam kunulinoj en mia sklaveco,
Vi, juna idar' de pŝapatro Jakobo!...

Sceno 2

Esthero - Lizo - Ĥoro.

Hebreino (kantas el ekstercenejo),

Fratino, jen voĉo nin vokas.

Alia Rekonas mi ĉarman eksonon. Ĝi estas

Reĝino.

Ambaŭ Ni kuru, fratinoj, ĝin.

Reĝino nin vokas,

Ni veru, alian Reĝinon!

Ĥoro (tuta) eniras el diversaj flankoj sur la scenejon).

Reĝino nin vokas,

Ni veru, alian Reĝinon!

Lizo Ĉielo! Ho Kiom da belaj, senkulpaj

Knabinoj mi vidas alveni el ĉie!

Ho! Kiel amindaj, modestaj vizaĝoj!

Ho! Kresku espero de sankta nacio!

Ho! Viaj senkulpaj sopiroj, similo

Al purpuraj aromoj, alflugu al Dio!

Ho! Dio rigardu vin kaj kvietigu!

Esthero Filinoj, aŭdigu el plendaj kantadoj.

Per Kriz vi ĝemas, dum mi sopiregas
Pri malfeliĉegoj de Kara Siono!

Hebreino Sion' Kompatindo! Ve, perdis vi glozon!
(Kantas sola) Tutmondo admiris jam vian brilecon!
Vi estas nur polvo! Pri via grandeco
Nun al ni nur restas malĝoja memoro!
Sion', ĝis ĉielo vi jam altigita,
Ve, nun ĝis Infero vi malaltigita,
Ho! ĉiam mi resta sen voĉo,
Se vian doloron per plendaj kantadoj
Ĝis lasta elspiro mi ne memorigos!

Ĥoro Ho bord' de Jordan'! Ho felica Kamparo!
(tuta) Ho sankta Montaro! Ho Valo fruktiga!
Multegaj miraklaj vin gloras!
El dolĉa la lando prapatra
Ĉu ĉiam mi estos pelitaj?

Hebreino Sion'! Ĉu mi vidos refari remparojn,
(sola) Kaj viajn turegojn je belaj tegmentoj?
Ĉu vidos mi el ĉiuflanko
Popolojn, Kun Kantoj, alkuri al festoj?

Sceno 3.

Esthero - Mardoko - Lizo - Ĥoro.

Esthero. Ho! Kiu malpia maltimas alpaŝi?
Ha! Kio? Ĉu vere? Mardoko! Ho patro!
Anĝelo de Dio, sub sankta flugilo
Vin certe Kondukis, Kaj Kaŝis l'alvenon!
Sed, Kial vi havas malĝojon sur frunto,
Mortiĝan vestaĵon, Kaj, cindron sur haroj?
Ho, Kiaj novaĵoj?

Mardoko Reĝin' malfeliĉa!
Popolo senkulpa! Ho sorto fatala!
Jen: legu l'ordonon malpian, Kruelan!
Ni ĉiuj pereas! Ve pri Israelo!

Esthero Ĉielo! Teruro min premas en Koro!

Mardoko Jen: Oni ekstermos tutrason hebrean!
Kruela Amano plenregas nun sur ni!
Jam oni pretigis tranĉilojn Kaj glavojn,
Kondamnis sen juĝo la tutan nacion!
Malpia Amano, de ras' Amaleka,
Klopode plenumis ĉi tiun atencon,

Kaj Reĝ, tro Kredema, subskribis l'ordonon.
Ĉar Kontraŭ ni tiu malpia parolis,
Kaj diris, Ke nin abomenas hsmaro,
Ordonoj eliris! En ĉiuj Reĝlandoj
Tagdato fiksiĝis por tiaj mortigoj!
Ho Dio, ĉu Lumigos Vi al sangversadoj?
Frapantoj indulgos nek sekso nek aĝon;
Nin ĉiujn mangados vulturoj kaj tigroj!
Ve, venos terura ĉi tag'.... post dek tagoj!

Esthero Ho Dio! Vi permesas mortigajn ordonojn!
Ĉu Vi do forlasis idaron Jakoban?

Unu el plej junaj hebreinoj Mardoĥeo Ho Dio! Nin Kiu defendos, se ne Vi?
Esthenjo, se prave ploradas infanoj,
Kontraŭe, vi, sola espero de l'raso,
Vi devas paroli, ĉar horoj gravegaj,
Kaj tempo rapida, kaj tago proksima,
En Kiu eĉ nomo "hebreo" pereos!
Ekzemple de Sanktaj Profetoj, nun, iru,
Parolu al Reĝo pri via naskiĝo.

Esthero Ve! Ĉu vi ne scias, Ke Reĝoj suvereaj

For homaj rigardoj protektas la Reĝon?
En fund' de l'palaco, terure majesta,
Li restas for vido de ĉiuj regatoj.
Se maltimegul', ne vokita, maltimis
Prezenti sin, li senespere tuj mortos,
Escepte se Reĝo, por savi l'Kulpulon
Bonvolis lin tuŝi per sceptro timinda....
Ordono altruda al ĉiuj, egale
Deviga al Kiu ajn rango Kaj sekso.
Mi, Kune Kun li, mem sidanta sur Trono,
Mi, Kiel l'aliaj, obeas l'ordonon;
Por Kun li paroli, mi devas silente
Atendi ĝis Kiam li venos aŭ vokos.

Mardoko. Nu? Kiam vi vidas, Ke l'gento pereas,
Esthenjo, ĉu vi nun Kalkulus pri vi mem?
Jen Dio parolas.... Vi timus nur homon?
Pli multe, Esthenjo.... eĉ vivo... ĉu al vi?
Ĉu ĝi ne... al sango de Kiu vi venas?
Ĉu ĝi ne... al Dio, al Kiu vi ŝuldas?
Ĉu... Kiam li nin alKondukis al trono,

I.3

Li vin ne rezervis poz savi la genton?
Pripensu pri tio: Vin Di' ne elektis
Poz vante mizigi popolojn aziajn,
Poz ĉarmi okulojn de bronzoj malpiaj.
Poz celo pli nobla Li uzas piulojn.
Oferi sin mem por Li Kaj religio,
Jen devo plej sankta de Israelido.
Felicâ se por Li eĉ vivon vi riskas.
Ĉu vere bezonas Li nian Kunhelpon?
Ĉu, Kontraŭ Li, povas Potencoj sur Tero?
Se, poz Kontraŭstari Lin Reĝoj Kunigus,
Poz ilin dispeli, sufiĉas Li venu
Parolu.... Kaj ilin Li enpolverigus!
Per sola eksono de Lia Elvoĉo
Tuj maro forfluas, ĉielo tremegas;
Ĉe Li, samvaloras Tutmond' Kaj sablero,
Kaj bonoj malfortaj, senpovaj, mortemaj,
Tutpezas ne pli ol se ili ne estas!
Se Li de Amano permesis projektojn,
Eblege, per tio, Li volis certiĝi

I.3

Pri via fervoro. Li mem min Konsilis
Vin preni, ho kara Esthenjo, kaj al mi
Elmontris la vojon kaj paŝis antaŭen
Se vane Li vokis vin, via neago
Neniel haltigos la brilajn mirakloj n.
Li povas frapegi Amanon, kaj rompi
Katenojn per man' plej malforta sur Tero.
Kaj vi, rifuzinte ĉi tiun favoron,
Vi eble pereos, kun tuta la raso!

Esthero. Vi iru. Kun ĉiuj Hebreoj en Suso
Fervore preĝadu dum tago kaj nokto.
Min helpu per petoj al Di', akurate
Vi fastu en daŭro de tiuj tri tagoj.
Jam ekkomenciĝis mallumo de l' nokto;
Sed, morgaŭ, tuj kiam tagiĝo heliĝos,
Kontenta je morto, ~~so~~ devor mi morti
Por mia nacio, mi mem min oferos.
Deiru vi iom .....

(Hozo malproksimiĝas, kaj deiras ĝis la fundo de la scenejo).

Sceno 4

Esthero - Lizo. Ĥozo

Esthero — Ho Rego tre gloza!
Jen estas mi, antaŭ Vi, sola, tremanta!
Ho, Kiom da fojoj la patro min diris,
Ke Kun ni Vi juris por sankta Kunligo.
Por Kiu popolon amindan, amege
Vi faris elekton de niaj Prapatroj.
Per sankta Parolo, Vi ankaŭ al ili
Promesis felicon Kaj daŭron senfinajn.
Ve, tiu maldanka popolo malobeis;
L'amata nacio disigis de l'Kredo,
Forlasis Sinjoron Kaj Patron, por doni
Al Dioj aliaj adultan honoron.
Ve! Nun gi obeas al fremda reganto;
Ne sole gi sklavo!.. Gi eble pereos!
Malpiaj venkintoj insultas al plorojn,
Malverajn diajojn redankas pro venko,
Kaj volas, per unu frapego, detrui
Popolon, altaron, Kaj Nomon de Dio!

I. 4

Ĉu eble fremdulo, post Viaj Mirakloj
Forigus esperon de Viaj Paroloj,
Forprenus al homoj plej karan el donoj:
Sanktulon venontan, de ni atendatan!
Ne! Vi ne permesu, ke gentoj malpiaj
Nin buĉos, mutigos la solan nacion
De kiu, en Mond', Vi ricevas prikantojn!
Ho, montru vantecon de tiaj diaĵoj!
Vi metis min inter ĉi tiujn fremdulojn;
Vi scias, malamas mi krimajn ĉi festojn;
Kaj estas por mi malpiaĵoj kaj pekoj
Iliaj manĝado-trinkado-festenoj.
Eĉ tiun ĉi gloron al mi devigatan,
Kaj kronon per kiu mi devas brilegi
Dum tagoj solenaj de festoj kortegaj,
Mi ilin intime, sekrete, malŝatas;
Mi cindron pli amas ol vantajn luksaĵojn;
Mi amas nur antaŭ Vi larmojn verŝegi!
Atendis mi horon de Via Ordono,
Por preni defendon de Via Popolo.

Jen estas momento. Per tuja obeo,
Mi iros al Trono de Reĝo timinda.
Por Vi mi Klopodas, Kun mi Vi ĉeestu
Ĉe Reĝo fiera Kaj Vin ne Konanta.
Ordonu, Ke antaŭ mi li Kvietiĝu,
Ke li allogiĝu per miaj paroloj.
Vi regas sur tondron, ventegon, Ĉielon,
Instigu lin Kontraŭ Tiranojn de l'gento!

Sceno 5

(tute kun kantoj)

Ĥoro

Hebreino (sola) Ni ploru! Ni ĝemu! Fidelaj fratinoj,
Ni nin ne detenu je larmoj!
Rigardu al Sankta Montaro!
Ĉar savon ricevos el ĝi Senkulpeco.
Ho timoj mortigaj!
Tuj Israelidoj perecos! Ve, ploru!
Ĉu sub la Ĉielo jam estis
Pli granda motivo por ĝemi!

Ĥoro (tuta) Ho timoj mortigaj!

Alia Hebreino Ĉu ne tro jam, Ke malaminda venkinto
De glora Siono detruis Majeston,
Kaj ĉien forprenis, sklavigis urbanojn!

Ĥoro (tuta) Ho timoj mortigaj!

La sama Hebreino Ve! Kiel malfortaj ŝafidoj ĉe lupoj,
Ni povos nur ĝemi!

Alia Forigu, dissiru ni vantajn rubandojn,
Ĉi tie, sur kapoj!

Alia Ni nin kovru per vestajoj
Taŭgaj por tenura festo
Preparata de Amano

Alia Kia sangverŝado ĉie!
Buĉigas samtempe maljunaj kaj junaj,
Fratino kaj frato,
Filino, patrino,
Filo apud sia patro!
Amaso da korpoj, da membroj ŝiritaj,
Ne enterigitaj!
Ve! Korpojn de l' Sanktaj dissiras
Kaj tigroj kaj leopardoj!

Unu el plej junaj hebreinoj.

Ve! Juna ankoraŭ,
Pro kia krimaĵ' mi meritis suferojn?
Vivo apenaŭ komencis kreskon,
Mi defalos kiel floro
En tago unua!
Ve! Juna ankoraŭ,
Pro kia krimaĵ' mi meritis suferojn?

Alia

Senkulpaj, ni pagas pro pekoj prapatraj!
Por kio, ve, tiuj ĉi vanaj sopiroj?
Prapatroj jam pekis, prapatroj nun mortis!
Kaj krimojn iliajn ni pagas!

Ĥoro (tuta)

Ni preĝas Sinjoron. Li Di' de bataloj.
Ne, ne, Li neniel volos,
Ke buĉiĝu ni, senkulpaj!

Hebreino (sola)

Kio? – dirus malpiulo –
Kie estas ĉi Dio timinda,
Por Israelo kiel Potenca?

Alia

Ĉi Dio glora, Sinjor' ĵaluza,
Tremegu, gentoj de Tero
Ĉi Dio glora, Sinjor' ĵaluza,

Estas sola Ĉielestro,
Fulmotondro Kaj ventego
Ne obeas viajn Diojn!

Alia. Li renversas maltimulon,

Alia. Li protektas malfortulon.

Ĥoro (tuta) Ni preĝas Sinjoron. Li Di' de bataloj.
Ne, ne, Li neniel volos,
Ke buĉiĝu ni, senkulpaj!

Du hebreinoj Dio, Kiun gloro Kronas,
Dio, Kiun lumo vestas,
Dio, Kiun nubo portas,
Kies Tronon subtenas Anĝeloj,

Du aliaj el plej junaj. Kiu volas, Ke simplaj infanoj
Al Vi prikantu Kun ili,

Ĥoro (tuta) Vi vidas niajn danĝerojn!
Pro Via Nomo, ni venku;
Ke Via Gloro neniam
Briligu fremdajn Diaĵojn.

Hebreino (sola) Vin armu por nin venĝi
Alvenu Vi, Kiel antaŭe al gento!

Malboruloj Komencu hodiaŭ
Timegi reverĝojn,
Fariĝu similaj je polvo, pajlero,
Kiujn vento forblovas.

Akto II.

Teatro figuras ĉambron, kie staras Trono de Asuero.

Sceno 1.

Amano - Hidaspo.

Amano Apenaŭ tagiĝas! Ho kiel malfrime
Kondukas vi min en ĉi lokon timindan!

Hidaspo Vi scias, ke jur min vi povas konfidi.
Sinjoro, sur ĉiuj ĉi pordoj mi estras.
Eniru. Ĉi tie neniu nin aŭdos.

Amano Pri kia sekreto vi volas paroli?

Hidaspo Sinjoro, dankega pro viaj bonfaroj,
Memoras mi ĉiam, ke al vi mi ĵuris
Raporti al vi per sinceraj avertoj
Pri ĉiuj sekretoj en tiu palaco.
Nu, Reĝo ekŝajnas al mi, malĝojega;

II.1

Ĉi nokton ekscitis lin songo timiga:
Dum ĉio en ĉambro trankvile silentas,
Li laŭte parolis, kun kria teruro.
Alkuris mi. Li paroladis malorde.
Li vokis: Jen al li danĝero minacas,
aŭ: Jen malamiko... kruela rabisto...
Kaj nomon „Ethero" li eĉ elparolis.
Kun tiaj teruroj li nokton pasigis.
Sed, ĉar li ne povis ekdormi, li volis
Forpeli el kapo funebrajn ideojn,
Ordonis alporti al li pergamenojn
Sur kiuj, atente, veremaj skribistoj
Laŭtaĝe registras novaĵojn en Regno.
Ĉiama enskribo de servoj, ofendoj,
Kaj ankaŭ de punoj kaj de rekompencoj.
Mi lasis lin iom kvieta en lito,
Nun, li atentege aŭskultas legadon.

Amano Pri kia epoko li interesiĝas?

Hidaspo Li aŭdas pri ĉiuj gloraĝaj epokoj
De Ptempo en kiu sur Tronon Ĉirusan

II.1.

Proklamo de loto feliĉa lin metis.

Amano. La sonĝon, Hidaspo, ĉu li do forgesis?

Hidaspo. El ĉiuj sorĉistoj konataj en Kaldo,
Li ĵus kunvenigis plej bonajn, plej lertajn
Por legi el sonĝo ĉielajn aventojn ....
Sed, vi mem hodiaŭ... Kun stranga ekscito
Vi ŝajnas min aŭdi. Ĉu ia sekreta
Klopodo malhelpus al via feliĉo?

Amano Vi miras pri timo, envio, malamo,
Al kiu kiela mi estas? Mi, ofte
Pli malfeliĉulo ol miaj regatoj!..

Hidaspo Ĉu iu feliĉa pli ol vi sur Tero?
Ĉar antaŭ vi genufleksadas Tutmondo ...

Amano Tutmondo!.. Ve, homo ... nur sklavo malnobla
Min ĉiam fiere malŝatas.... min mokas...!

Hidaspo Ho! Kia krimulo al Regno, al Reĝo ....?

Amano Ĉu konas vi nomon „Mardoko"?

Hidaspo Jes!... Kiu?
Ĉu l'estro de l'raso malbona, malpia?..

Amano Jes, li mem!...

Hidaspo Sinjor', ĉu al via feliĉo
Ĉi tiu malforta kapablas malhelpi?
Amano. Ĉi tiu fiera neniam min ŝatis!
Min vane favoras plej granda el Reĝoj
Per gloraj signiloj de plejaj honoroj.
Dum, antaŭ mi, ĉiuj Persanoj respekte,
Profunde sin klinas kun frunto sur tero,
Li... sidas fiere, kun kapo senmova,
Li juĝas honorojn malpia servemo,
Al mi li prezentas ribelan vizaĝon,
Kaj eĉ ne bonvolus mallevi rigardojn.
Sed li de l'palaco okupas pordegon,
Je kia ajn horo mi en-aŭ eliras,
Kun lia vizaĝo mi ekrenkontiĝas!
Ankoraŭ dum nokto ĝi min persekutas!
Hodiaŭ, mi antaŭ tagiĝo alvenis.....
Mi trovis lin strange pudritan kaj palan,
Kun vestoj ŝiritaj. L'okuloj ankoraŭ
Elmetis sub cindro la saman memŝaton....
Amiko, pro kio li tiel maltimas?

Vi tiel atenta ĉi tie, pri ĉio,
Ĉu kredas vi, ke por li, in parolis?
Sur kian protekton li metis l'esperon?

Hidaspo. Sinjoro, vi scias, ke liaj avertoj
Malkovris mortigan konspiron de Tharo.
Tuj Reĝo promesis al li rekompencon;
Sed Reĝo, kredeble, forgesis pri tio.

Amano. Ne,--kun vi mi devas paroli laŭ vero.
Mi sciis bonigi maljuston de l'sorto.
Veninta persekuton ankoraŭ tre juna,
La landon en kiu min oni aĉetis
Mi regas, mi, ĵiĉa nun kiel regnestroj.
Glorigas min miaj multnombraj infanoj:
Nur reĝa ozkrono sur kapi' al mi mankas.
Sed, (kia blindeco fatala kaj homa!)
Nescias mi kial nedaŭra dolĉeco
De tiuj honoroj apenaŭ min tuŝas!
Mardoko sidanta ĉe pord' de palaco
Ne ĉesas min ĝeni kaj min koleregi;
Kaj tedas min mia gloreya altrango,

II.1.

Ĉar suno lumigas al tiu perfida!...

Hidaspo. Sed, vi liberigos de li post dek tagoj;
Ĉar tutan la genton dissiros vulturoj....

Amano. Mi malpacience travivos ĝis tiam!
Al vi mi Konfesu la Kaŭzon de l'vengo.
Jen: li mem, al mi rifuzinte sin fleksi,
Liveris la rason al fraproj mortigaj.
Al mi ne sufiĉas, Ke sola li morta;
Ĉar vengo neplena ebligas revengojn.
Ĉu puno trovigus troega por vengi
Potencan Amanon pravege Koleran?
Necese, Ke fraproj tremigu Tutmondon,
Kaj montru samtempe ofendon Kaj punon;
Ke tuta nacio per glav' eksterniĝu;
Ke iam Homaro eksciu Kun miro:
„Jam estis ribela popolo, Hebreoj
„Ekzistis sur Tero, sed unu el ili
„Maltimis eksciti Koleron Amanan....
„Tuj tuta nacio el Ter' malaperis....

Hidaspo Sinjoro, ĉu do ne pro sang' Amaleka,

Vi kiel ekvolas eksterni Hebreojn?

Amano Mi scias, Ke ilin senfine mi devas
Malami pro tiu deven malfelicâ;
Ke ili forpreneis de Amaleki doj
Kaj vivojn, kaj ĉion.... eĉ lastajn brutarojn;
Ke eroj malmultaj apenaŭ savigîs;
Sed Kredu, en mia altrango, l'animo
Priatentigînta al mia grandeco
Klopodis nur iom pro vengô de sango.
Mardoki, jen Kulpulo, Kaj tio sufiĉas!
Mi Kontraŭ Hebreoj parolis al Regô,
Mi iom mensogis, Kaj eĉ Kalumniis:
Pri l'Tron' atakata, (li kremis pro vivo),
Pri ili ribelaj, potencaj Kaj riĉaj,
Pri Dio ilia Mem, Li malamiko
Al ĉiuj aliaj Diaĵoj.- „Ĝis Kiam
„Toleros ni vivon de tiu ĉi genro,
„Kaj pregôjn malpiajn en Regno?- Fremduloj
„De nia Persujo, ribelaj al Regoj,
„Kaj kvazaŭ apartaj de tuta Homaro,

„Nur volas malhelpi al nia trankvilo.
„De ili al ĉiuj, de ĉiuj al ili
„Malamo egala. Vi antaŭprizorgu,
„EKpunu iliajn plej kulpajn agadojn,
„Kaj vin mem ricîgu per la konfiskaĵoj.»
Mi diris._Tuj Reĝo min kredis. Kaj donis
Al mi sigelilon de Povo plej supra.
Li diris:«Vi zorgu pri reĝa felicô!
„Nu do, senindulge tuj ilin mortigu;
„Iliaj ricaĵoj al vi apartenu!»
Li tiel kondamnis la tutan nacion.
Kun li mi daturnis por taŭ'de mortigoj.
Protrasto al mort' de îi tiu perfida
Vengeman animon en mi dolozegas;
Kaj io malhelpas al mia ĝojego:
Dek tagoj n ankoraŭ mi devas lin vidi!
Hidaspo Sinjoro, ĉu lin vi ne povas eksterni?
Nur petu, ke Reĝo al vi lin fordonu.
Asmano Atendas mi horon plej taŭgan por tio!
Vi, kiel mi, scias, ke Reĝo obstina,

II 2.3.

Facile, terure Koleras, Kaj ofte
Haltigas eksfaron de niaj projektoj.
Sed, eble, malsprave mi malkvietigas,
Kaj, pozli, nur estas Mardoĥ' senvalora.
Hidaspo Pro Kio prokrasti? Tuj iru, rapide
Ordonu starigi pozli pendigilon.
Amano Jen bru'!.. Mi forizas!.. Se Reĝ'min alvokas...
Hidaspo Sufiĉas!..

Sceno 2

Asuero - Hidaspo - Asafo - Sekvantaro de Asuero.

Asuero. Do, vere, sen tia averto,
En lit', du perfidaj regatoj min estus
Frapintaj!.. Min lasu!.. Asafo nur restu!..

Sceno 3

Asuero - Asafo.

Asuero Mi tion konfesas: mi preskaŭ forgesis
(sidiĝas sur trono) La krimon atencon de du perfiduloj.
Dufojojn mi tremis, je l'aŭda revido
Pri la terurajoj tiamaj!.. Mi sciis,
Ke Krimo ilia neniel sukcesis,

II. 3

Ke puno fariĝis dolora, mortiga;
Sed tiu fervora regato, li kiu
Lertege malkovris perfidan konspiron,
Kaj montris al mi la minacan ponardon,
Kaj savis min, ankaŭ Persujon, per kiaj
Honoroj ricevis li dankon ŝulditan?

Asafo. Per belaj promesoj!... nur tion mi scias!...

Asuero. Ho, kulpa forgeso de servo plej granda,
Kaŭzata nur de priskupoj por Regno!
Al reĝo devigas sinsekvaj aferoj,
Senĉese altrudas sin novaj objektoj;
Estontajn li timas, estantajn li vidas,
Sed li rapidege forgesas estintajn!
Kaj el korteganoj konstante penantaj
Por al ni elmontri bruantan fervoron,
Neniu troviĝas sufiĉe atenta,
Sufiĉe sindona al nia gloramo,
Por nin memorigi pri serv' forgesita,
Anstataŭ nur pri malbonagoj punindaj!
Preferas, ja, mi ne atingi krimulon,

Oh resti nedanka por tia bonfaro.
Ĉar, Kiu nur volus sin riski por Reĝo?...
Sed, tiu bonfara por mi, ĉu li vivas
Ankoraŭ?

Asafo Li vivas la lumon de l'Suno

Asuero Li longe prokrastis por rekompencigo.
En land' in alproksima, kredeble, li vivas?

Asafo Plej ofte li sidas ĉe pord' de l' palaco.
Neniel li plendas pri vi aŭ pri sorto.
Li vivas, Ho Reĝo, per viv' malfelica!...

Asuero Ha! Despli mi devas atenti pri virto,
Ju pli ĝi forgesas sin mem! Vi lin nomas?...

Asafo. Mardoko... Jen estas la nom' jus legita....

Asuero. Kaj... kiado?

Asafo. Ho Reĝ', ĉar mi devas paroli,
Li estas el sklavoj al mort' kondamnitaj,
El bordo Jordana venintaj Eŭfraton!...

Asuero Ĉu li do Hebreo? Ĉielo!... Ho Kiam
De propraj regatoj mi mem dangerigis
Hebreo prizorgis por krimon deturni,

II 4.5.

Hebreo min savis el glavo de Persoj!
Nu! Ĉar li min savis, mi haltos neniel!
He! iu!

Sceno 4

Asuero - Hidaspo - Asafo.

Hidaspo Sinjoro?

Asuero Rigardu ĉe l'pordo,
Ĉu iu el Kortegularo ĉeestas!

Hidaspo Amano ĉeestas de antaŭ l'tagiĝo!

Asuero Eniru li ... Eble li min bonkonsilos!..

Sceno 5.

Asuero - Amano - Hidaspo - Asafo.

Asuero Eniru, feliĉa subteno de Regno,
Plej bonkonsiliisto, vi kiu oftege
Jam faris regecon sur min pli malpeza;
Intima ripro ĉo min maltrankviligas.
Mi konas veremon de via fervoro,
Kaj vian malamon al ĉiu mensogo;
Por mia profito vi ĉiam Klopodas.
Nu, diru do, kiel, Regnestr' grandanima

II.5

Plej gloze honozos regaton amatan,
Kaj kian brilsignon, tutindan je princo,
Poz plenrekompenci meriton kaj fidon?
Neniel limigu al mia dankeco,
Parolu libere al Rego potenca.

Amano (aparte) Poz mi mem, Amani, mi parolos, car kiun
Se ne min, li tiel elevolus honori?

Asuero. Nu?

Amano. Rego mi sercas, kaj mi konsideras
Konduton, kutimojn de Persaj Monarkoj...
Sed vane revidas mi vicon ilian.
Poz ilin imiti, cu indaj ekzemploj?
Vi donos modelojn poz via idaro.
Vi volas redonki fervoran regaton;
Nu, nobla animo nur satas honorojn.
Do, Rego, mi volus, ke tiu felica,
Hodiau, vestata per rega mantelo
Kaj via glozega ozkrono, sur unu
El viaj cevaloj kun luksa kovrilo,
Montrigu en Suso al viaj regatoj;

Poz Kuke plenumi triumfon Kaj glozon,
Ke eminentulo potenca, altranga,
(Se eble,) l'unua post vi en la Regno,
Per mano Konduku la Belan Ĉevalon,
Kaj li mem, Kun festaj vestajoj, praŝante
Sur placoj publikaj, Kriadu: « Morteraj,
» Ĵuj vi genufleksu; ĉar Reĝo tiele
» Redankas meriton, Kaj Kronas sindonon. »

Asuero. Mi vidas, Ke Saĝo Mem al vi lumigis;
Kaj mian deziron vi trafe plenumis.
Rapidu do, Zorgu Kun akurateco,
Pri tio ĉi, Kion vi al mi Konsilis.
Kaj Vizto Brilege montriĝu. Tuj voku,
Ĉe porĉ' de l' palaco, Hebreon, Mardokon;
Ĉar lin mem Hodiaŭ mi volas honori.
Aranĝu triumfon, Kaj antaŭ li, paŝu
Laŭtege Krianta en Suso « Mardoko ».
Ordonu, Ke ĉiuj al li genuflaksu....
Eliru nun ĉiuj

Amano (aparte) Ho Dioj!

Sceno 6 (Asuero).

Asuero — Premio

Sendube miriga! Neniam zegato
Eksentis ĝojegon de tia honoro!
Sed, ju pli ĝi estos brilaga kaj granda,
Kaj raso de tiu hebre' malaminda,
Des pli mi protektas min mem kaj elmontras,
Ke mi, Asuero, ne restas maldanka,
Ke mi apartigas senkulpan kaj Kulpan....
Kaj poste.... pereos la gent' abomena ....
Ĉar krimoj iliaj....

Sceno 7.

Asuero. Esthero. Lizo. Thamaro. Parto de Hôro. (Esthero sin apogas sur Lizo. Kvar Hebreinoj' zelenas trenaĵon de ŝia robo.

Asuero — Ho! iu alvenas
Sen mia ordono! Ho! Kiu kuraĝas
Maltimo ĉi tien aliri al morto?
Gardistoj!... Esthenjo! Vi!... ne atendita!...

Esthero — Filinoj, ha!... helpu al via reĝin'!.... Mi
Mortiĝas!... (ŝi svenas).

II.7

Asuero Ho Dioj Potencaj! Ho stranga
Paleco ĵus senkolorigis vizaĝon!
Esthenjo! Vi timas!.. Mi estas nur frato!
Ĉu do por vi tiel severa ordono?
Ho vivu!... Ke tiu orsceptr' prezentata
Vin tute certigu pri mia indulgo!

Esthero Ĉu voĉo saviga ordonas mi vivu,
Kaj rekonsciigas min preskaŭ senvivan!

Asuero Ĉu vi ne rekonas la voĉon de l'edzo?
Ankoraŭ, ho vivu!.. Ho rekonsciiĝu!...

Esthero. Ho Reĝo, mi ĉiam rigardis kun tremo
Gloregan majeston de via vizaĝo!
Terura kolero de viaj okuloj
Timige impresis sur mian animon!
El tiu ĉi Trono, mi kredis, ke tondro
Tuj al mi ektrafos por min polverigi!
Ve! Ĉu maltimulo, sen tremo, nur povus
Elporti fajrecon de via rigardo!
Ho! Tiel kolero de Di' Mem brilegas....

Asuero Ho Suno! Ho fonto da lumo senmorta!

II.7

Mi maltrankviligas mi mem, Kaj sen kremo,
Ne povas ĉesti al ŝiaj eksplendoj!
Reĝin', Kvietiĝu; for timo premanta;
Al vi Asuero sklaverne obeas.
Ha! prove nur mian fervoron Kaj amon!
Ĉu al vi mi donos duonon de l' Regno?

Esthero Ĉu eble? Ho Kiam Tutmondo vin timas,
Al vi genuflektas kun frunto en polvon...
Ĉu vi ekrigardus Kompate sklavinon,
Kaj al mi ekvolus obei praiarmo?

Asuero. Min kredu, Esthenjo, kaj sceptro, kaj regno,
Kaj eĉ respektegoj pro tiuj ŝuldataj
Altrudas sin glore, sed ankaŭ maldolĉe,
Kaj ofte lacigas mem la posedanton!
Nur en vi eksentas mi ian allogon;
Ĝi, ĉiam agrabla, neniam laciga,
Ĝi, dolĉa potenco de virto aminda!
Esthenjo, en vi, Senkulpeco kaj Paco!
Vi de mi forpelas ĉagrenojn, vi faras
Ĝojegaj al mi plej maldolĉajn momentojn!

II.7

Kaj eĉ pli! Kun vi sur ĉi Trono, mi malpli
Timegas Koleron de astroj Kontraŭaj.
Mi Kredas, ke via vigaĝo fordonas
Al Krono radion amatan de Dioj.
Kuraĝu do diri, kaj kaŝi nenion
Pri grava Plafero iginta vin tien.
Ĉu zorgo, celaĵo vin ĝenas aŭ urĝas?
Aŭdante min vi al Ĉielo rigardas!...
Parolu, mi certe plenumos deziron,
Se povas mortema certigi sukceson.

Esthero Ho dolĉa! Vi min Konfidige honoras!
Jes, urĝa celaĵo min igas vin peti,
Kaj al mi felicon aŭ malfelicego
Farigos, Ho Reĝo, laŭ via decido!
Nur vorto de vi trankviligos min, faros
Min la plej felica el ĉiuj Reĝinoj!

Asuero Ha! Kiel vi pitkas nun mian scivolon!

Esthero Sinjoro, se vere post via pardono
Vi volos plenumi nun mian deziron,
Komence, permesu hodiaŭ, Esthero

II. 8

Ĉe tablo gastigu vin, Reĝo tre glora.
Alestu Aman' al honor' de l' festeno.
Mi antaŭ li rompos ĉi gravan silenton!
Li devas ĉeesti al miaj Klarigoj!

Asuero Esthenjo, vi strange min maltrankviligas!
Sed, ĉio fariĝu laŭ via deziro!

(Al sekvantaro) Ĝisiku Amanon, poŝ dial Reĝino
Kiuĝ gastinvitis, Kaj li akuratu!..

Sceno 8.

Asuero-Esthero-Lizo-Thamaro-Hidaspo-Parto de Horo.

Hidaspo Ho Reĝo, en tiu ĉi ĉambro Kunvenis
Vokitaj de vi Scienculoj Kaldanaj.

Asuero Princin' priokupas min stranga sonĝaĵo....
Vi mem partoprenas por ĝiaj signifoj.
Nu, vi post Kurteno aŭskultu parolojn,
Kaj al mi vi helpu per viaj Konsiloj.
Por vi kaj por mi perfidulon mi timas!..

Esthero Thamar' vi min sekvu. Vi, junaj filinoj
Timemaj, ne timu Kortegon; atendu
Ĉe tiu ĉi Trono, ĝis mia reveno!...

Sceno 9

Lizo - Parto de Ĥoro.

Lizo Fratinoj, jen stato por ni malcertega!
Kiu venkos? Esthero? Amano?
Ĉu Dio, aŭ ĉu homoj,
Kies voloj plenumiĝos?
Vi vidis kun kiel terura kolero
Rigardis la Reĝo, kun frunto severa!

Unu el Hebreinoj Fajreroj elŝprucis el liaj okuloj!

Alia Kaj voĉo similis al tondro terura!

Lizo Kiel kolero bruega
Post momento tuj eksilentiĝis?

Hebreino (Kantas) Momento nur ŝanĝis animon malmolan!
Leono fiera fariĝis ŝafido!
Jen Dio, nur Dio, enigis en koron
Ĉi tiun dolĉecon!

Ĥoro (Kantas) Jen Dio, nur Dio, enigis en koron
Ĉi tiun dolĉecon!

La sama hebreino (Kantas) Kiel rivereto
Obeas direkton de homa laboro,

II.9

Kaj ĝi, disverŝante defluon de l'akvo
Fruktigas Kamparon tutan,
Nu, tiel Divolo potencanin regas;
Li tiel Komandas al Koro de Reĝoj.

Lizo Mi timas, fratinoj, ĉar nuboj densegaj
Mallumigas al tiu ĉi Reĝo;
Blindigas lin amo al siaj diaĵoj!

Hebreino Alvokas li nomojn iliajn malpiajn!

Alia Kaj ĵen steloj brilegaj en mezo de Ĉielo;
Ilin li ankaŭ adoras!

Alia Pri ili desegnoj ornamas palacon!

Koro (kantas) Ve! Kiuj forlasas Kreinton de l'homoj
Por adori artefaritaĵojn!

Hebreino (kantas) Di' Israela, lumigu al lia Kor'
Per larmoj, piuloj por helpo vin petas!
Vi l'erarvualon tiru for
Ĝi kiu Tutmondon mallume surkovras!
Di' Israela, lumigu al lia Kor'
Jam de longe, Vi silentas!

Unu el plej junaj hebreinoj. Elvoĉu mallaŭte, fratin'! Ho! se iu

II.9

Nin aŭdus, Kaj Kontraŭ ni eble parolus!

Lizo Filin' Abrahama, timego mortiga
Ŝajnas, jam nun, vin ŝanceli
He, se Kun perforto, malpia Amano
Minacus al vi mem per glavo tranĉonta;
Por Blasfemi Nomon Ĉiopovan
Volus trudi vian Konsciencon,
alia Hebreino. Aŭ, Reĝ' Asuero, Kun granda Kolero,
Se vi ne pletesos genuojn
Antaŭ idolaĵo muta,
Volus, Ke oni nin buĉu,
Kion, fratin' vi elektos?

La juna Hebreino Ĉu mi povus trompi Dion mian!
Mi pregŭs diajon sen forto, sen virto,
Arbar trunkon de vento sternitan,
Senpovan, sennovan, ĝin mem!

Ĥoro (Kantas) Diaĵoj senpovaj Kaj vantaj, neniam
Vi helpas al viaj pregantoj!
Ke Demonoj, Kun l'adorantuloj
Estu same sen fort' Kaj sen povo!

II g

Hebreino (Kantas) Per buŝo, per koro, per ĉio en povo,
Mi redankŭ Dion, kiu kreis vivon!
Ĉar en tiuj, en malĝojoj
La Plejbonan animo tutfidas.
Mi mortu, se tiel mi devas Lin glori!
Per buŝo, per koro, per ĉio en povo,
Mi redankŭ Dion, kiu kreis vivon!

Lizo Neniam mi miris pri glor'de malpia!

Alia hebreino. Kaj mi ne envias pri ĝoj'de malbona!

Lizo Li vivas, li ŝajnas ĝoja;
Oro brilas sur vestajoj;
Sen bridaj deziroj, senlimaj riĉajoj:
Nenia ŝopiro, nek gem' en aero;
Ek dormo, vekigo per kant'muzikila;
Li travivas en dolĉeco!

Alia. Por plej granda feliĉeco,
Li volas reviri per sia idaro;
Kaj, ĉirkaŭ festenoj, ridant'infanaro
Elĉerpas, kun li, el prokaloj, el ĝojoj!

(La tuta finigo de la sceno estas kun kantoj).

Ĥozo — Ĝoja ŝajnas popolo felica
Posedanta ĉi tiujn riĉaĵojn;
Pli ĝoja popolo senkulpa
Kiu kute fidas al Dio Ciela!

Hebreino (sola) — Por kraviri laŭ vantaj deziroj,
Malsaĝulo vanege klopodas;
Li ĥrovas malĝojon
En mezo de ĝojoj!

Alia (sola) — Felic' de malpia sencase malplena!
Ezanas li blinde, laŭ sia konfuzo;
Sed ni, serĉu la felicon
Nur en pac' de senkulpeco!

La sama (Kun alia) — Ho dolĉa pac'!
Ho lumo eterna!
Brilo ĉiam nova!
Felica Koz', kiu vin amegas!
Ho dolĉa pac'!
Ho lumo eterna!
Felica Koz', kiu vin ne perdas!

Ĥoro — Ho dolĉa paĉ'! (K.t.p.).

La sama (sola) — Ne paĉ' por malpia: li sercas, ĝi flugas!
Neniam en koro li ektrankviligos!
La glavo al li minacas,
La riproĉo en li batas.

Alia — La gloz' de krimulo rapide forflugas;
Nigra tombo por ĉiam lin kaŝas!
Tiele ne estos por Via servanto,
Revivos li, Dio, prei brila al tago!

Ĥoro — Ho dolĉa paĉ (K.t.p.)

Lizo — Fratinoj, jen brus en ĉambro apuda...
(Ne kantante) Jen voĉo.... Ni iru al nia Reĝino!

AKTO III.

Teatro figuras ĝardenon de Esthero, kaj flankon de festena salono.

Sceno 1

Asmano. Zarso.

Zarso — Jen do, de Esthero, la bela ĝardeno
Kaj luksa salono por reĝa festeno.
Sed, ĉar enirejo ankoraŭ fermiĝis,

Aŭskultu la timojn de via edzino !...
Pro sankta Kunligo de nia edzeco,
Elkaŝu, Sinjoro, la blindan Koleron ;
Ne montru vin, jam nun, kun nuboj sur frunto,
Ja, Reĝoj malamas riproĉojn kaj plendojn !
Vin solan, el Kortegularo, Reĝino
Invitis, do, vi mem vin gloru pro tio.
Se bato vin pikas, konfaro vin tuŝu.
Vi mem al mi tion oftege certigis :
Se iu ne scios tolori l'insulton
Nek doni al frunto ŝajnigan esprimon,
Li devas foriri, forkuri de l'Reĝoj.
Sagul' Kontraŭajoj Kuraĝe subportas,
Kaj ofte insult' ricevita silente
Elligis aliri plej glorajn honorojn !

Amano. Doloro ! Tenera turmento de penso !
Hontigo ! Ve ! Kiun menio forigos !
Hebre' malaminda kaj hont' al homaro
Ĝis reĝan mantelon, de mi mem, ricevis !
Ne sole li venkis min, sed, ve, mi, folie,

III.1

Mi estis heroldo por lia triumfo!
Perfida, insultis li mian konfuzon;
Eĉ tuta popolo, kun mokoj, observis
Hontiĝon videblan sur mia vizaĝo,
Konjektis pri mia proksima defalo!
Ho Reĝo kruela, teruze vi ŝercas!
Vi superdonacis perfidajn favorojn
Nur por min hodiaŭ dolore frapegi,
Kaj ankaŭ por min pli hontige premegi!

Zarso Pro kio riproĉas vi lin pri l'intenco,
Se kredis li nur rekompenci bonservon?
Kontraŭe, Sinjor', ĉu ne estas mirige,
Ke tiel longtempe prokrastis li dankon?
Cetere, li agis laŭ viaj konsiloj;
Vi diktis mem tiun malĝojan triumfon,
Vi, post li, l'unua en Regno!... Ĉu scias
Li vian malamon al tiu hebreo?

Amano. Li scias, ke al mi li ŝuldas pri ĉio...
...ke mi tutforgesis pro lia grandeco
(preterpaŝis)
Konsciencriproĉojn, detenojn kaj dubojn,...

III. 1

...Ke riprezentante lin, mi senkompate
Haltigis la leĝojn por frapi senkulpajn...
Pro li, mi malŝatis malamon de Persoj,
Mi amis, mi serĉis iliajn malbenojn,
Kaj vivon mi riskis!.. Kompense, kruele,
Jen li ĵus min ĵetis al mokoj iliaj!...

Zarso Ni solaj, Sinjoro, por kio sin flati?
Ĉi tiuj fervoro kaj zorgo montritaj
Por ĉion oferi al lia grandeco...
Ĉu ili ne celis nur vian memamon?
Ekzemple, ĉu vi ne pro via venĝemo
Kondamnis al mort' malfeliĉajn Hebreojn?
Sed, ĉu vi ne timas kontraŭan averton?...
Jes, vere korteg' kaj popol' nin malamas;
Eĉ tiu hebreo, (mi ankaŭ konfesas),
Li, plej honorata, min iom timigas!
Ĉi raso senĉese kontraŭas al nia!
Tre ofte sinsekvaj ĉagrenoj nin trafas!
Sed pensu profiti je honto nedaŭra.
Kredeble Bonsorto nin baldaŭ forlasos;

III. 1.

Nescias ĝi limojn al sia ŝanĝemo!
Prizorgu vi, antaŭ ol ĝi vin perfidas!...
Vi volus... pli alten?... Ho tremas mi, kiam
Mi vidas nun antaŭ mi profundegaĵojn!
Ve! De nun, defalo nur estos terura!
Ekserĉu alie trankvilon pli certan;
Reiru marbordojn de land' Hellesponto,
Al kiuj jam iris prapatroj, en tempo
En kiu, venĝemo de raso Hebrea
Forpelis Amalekidaron el lando
Idumo. Forkuru el sorto danĝera!
Forportu plej belajn el niaj riĉaĵoj.
Precipe mi zorgos por savi l'infanojn.
Vi fidu min pri foriradaj klopodoj.
Vi tamen atentu por ŝajni kvieta
Kaj mi plej rapide vin sekvos, kontenta.
Sur mar' plej ventege terura, ni riskus
Ne pli ol en tiu perfida kortego.
Sed iu rapide alvenas al mi. Jen
Hidaspo!

Sceno 2

Amano - Zarso - Hidaspo.

Hidaspo — Sinjoŕ, mi alkuras vin voki.

(al Amano) Ĉar via foresto ĥaltigas tutĝojon,
Poz peti vin, Reĝ' Asuero min sendis.

Amano Ĉu estos Mardoko al tiu festeno?

Hidaspo Ĉu eĉ ĉe Esthero vi montros ĉagrenon?
Nu? Ĉiam ĉi tiu Hebreo vin ĝenas?
Lin lasu kun ĝojo de vanta triumfo!
Li de Asueŕ ne eritos justecon!
Ĉu Reĝo mem ne vin aŭskultas, vin amas?
Post servo pagita, jen krimo punota,
Jen preta poz vi ornamita buĉaĵo!
Se mi ne eraras, Esthero vin helpos,
Pli faros efikon ol viaj konsiloj.

Amano Ho! Kiel mi estus felica pro tio!

Hidaspo Mi aŭdis respondon de klaraj sorĉistoj:
Jen: Baldaŭ fremdulo perfida atakos
»Reĝinon, ŝin frapos, ŝin volos mortigi..«
Sed Reĝo ne scias fraponton, li ponas,

Ke solaj Hebreoj Kapablas pri l'Krimo.

Amano Amiko, jes; ili nur monstroj danĝeraj.
Ilia dekano precipe timinda.
De longe Tutmond' abomenas ĉi genton.
Ni ĝin plej rapide forigu de l'Tero.
Ha, fine, mi ĝojas!... Vi, Zanjo, adiaŭ!..

Hidaspo Jen venas virina Korteg' de l'Reĝino.
Kredeble per kantoj la fest' Komenciĝos;
Eniru ricevi honoron ŝuldatan!

Sceno 3

Lizo - Ĥoro.

Unu el Hebreinoj Amano!

Alia Jes, li mem! Mi tremas, fratino!

L'unua Koro time, terure premiĝas!

La dua Li, de Israelo, fiera tirano!

L'unua Li kiu tremigas Teron!

Lizo Vidante lin, ĉu tuj lin oni ne konas
Pro lia maltimo kaj memestimego?

Alia En liaj okuloj, kolero, venĝemo!

Alia Mi kredis, ke, antaŭ li, Morto mem paŝas!

III. 3.

Unu el la plej junaj hebreinoj — Ĉu tiu ĉi tigro rekonis l'akiron?..
Nin kiam rigardis li, ŝajnis, fratinoj,
Ke ĝojo sovaĝa ekbrilas sur frunto!
Ja, mia sango ankoraŭ bolas!

Lizo — Pro nova honoro li pli fieriĝos!
Fratinoj, mi lin ekvidas!
Ĉe tabl' de Esthero, kaj apud la Reĝo,
Maltime li sidas!

Hebreino — Ho festenservistoj, mi petas vin, kiajn
Manĝaĵojn, trinkaĵojn, al li, vi prezentos?

Alia — Ĉar sango de orfoj,

Alia — Kaj ploŕ de malfortaj,

La dua. — Jen, por li, la plej agrablaj

La tria. — La plej dolĉegaj trinkaĵoj!

Lizo — Fratinoj, vi haltu je ploroj, sopiroj;
Nun kanti ni devas. Ke niaj kantadoj
Redonu trankvilon al koŕ Asuera!
Jam same, Davido, per dolĉaj akordoj
Forpelis malĝojon de Reĝo ĵaluza!

Hebreino — Popolo feliĉe, se Reĝo glorega

Ne sole obeon, sed amon posedas;
Felica popolo, felica mem Rego!
Hozo (tuta) Ho ripoz!, Ho trankvileco!
Por granda felico certigo eterna,
Kiam Supera Potenco
Konsiligas, per zorgo sencesa
Kun Justeco kaj kun Vero.

La kvar sekvantaj strofoj alterne kantas { voco sola / kaj Hozo tuta

Regoj, for Kalumnio, De ci monstro teruro
Gjaj krimaj atencoj Timu falsan dolcecon,
De la Statoj trankvilaj Ja en koro venjemo,
Pelas for harmonion! Se en buso kompato!
Volas gi sangavide Trompo serta kaj vigla
Kuri al senkulpulo Semas florojn sur vojon,
Sirmu Vi forestanton Sed, post pasoj, gin sekvas
Kontraü gia perfido! Senutila penteo!

Hebreino Se vento forblovas, disjetas nubegojn
(sola) Pelas foren fulmon, fulmotondron,
Bonrego malarmas mensogan parolon,
Forigas facile fripona trompanton!

Alia Grandan Reĝon mi admiras;
Per venko, triumfe li paŝas tra mondo,
Sed bonrage plej sage plej juste
Ne permesas, ke riĉa regalo
Malindulgos al la mabriĉulo.
Li plej bela don' de Dio!

Alia Vid vino esperas en li,

Alia De l'orfo li estas patro,

Ĉiuj (Kune) Kaj l'armeojn de tiu petanta por helpo
Kun kompato li rigardas.

Hebreino (sola) Ho Reĝo potenca, neniam aŭskultu
Konsilantojn kruelajn, mensogajn
Jen koro, vi vekiĝu
Ĉar sango senkulpa, tuj, estos verŝata
Kiam vi dormadas!

Alia. Ke, antaŭ vi, de nun tremegu Tutmondo;
Ke l'farno pri via valoro, proz ĉiam
Starigu Babilon al la malamikoj.
Se ili atakos vin, i li tuj falu;
Via forto tuj ilin renversu;

III.4

Via nomo tuj ilin dispelu!
Ilia anaro, se antaŭ la viaj,
Estu kiel aro da infanoj:
Se per unu vojo ĝi iras en Regnon,
Ĝi foriru per pli ol mil!

Sceno 4

Asuero - Esthero - Amano - Lizo - Ĥoro -

Asuero. (al Esthero) Jes, viaj paroloj mistere allogas,
Kaj nobla modesto de l'agoj valoras
Por mi pli ol oro kaj reĝa Potenco.
Sed, kara trezoro, el kie vi venas?
Kaj kia virtama patrino vin naskis?
Kaj kiu edukis vin tiel saĝeme?
Rapidu klarigi nun vian alpeton;
Esthenjo, plenumos mi viajn dezirojn.
Ĉi tion denove mi diras, eĉ se vi
Dezirus duonon de tiu ĉi Regno!

Esthero. Ha! mi ne sopiras pro tiaj deziroj!
Sed, ĉar mi tuj devas klarigi pri ĝemoj...
Ĉar Reĝo mem volas, ke mi tuj parolu....

III..4

Ĝi ekgenuas antaŭ Reĝo Pardonu!... Mi petas por mi mem, kaj ankaŭ
Por vivo de tiu popol' malfeliĉa!..
Ĝi kun mi pereos pro via ordono!..

Asuero Pereos?... Vi?... Kia popol'... kaj mistero?

(Ĝin subtenas) Amano Mi tremas!...

(mal laŭte) Esthero. La patr' de Esthero ... hebreo!
Ho Reĝo, de viaj mortigaj ordonoj
Vi scias gravecon!..

Amano (aparte) Ho Dioj!...

Asuero. Per kia
Ekbato trapikas vi mian animon!
Filin' de Hebreo!.. Vi!.. Sola amata!..
Esthenjo!.. Vi!.. la Senkulpeco, la Saĝo!...
Vi, kiun mi kredis ĉiela donaco,
Vi ĉerpis la vivon el fonto malpura!
Ho, mi malfeliĉa!..

Sinjoro, vi povos

Esthero ↑7 Rifuzi al mia petego! Mi tamen
Vin petas, ke vi nun, per lasta favoro,
Min lasu paroli ĝis fino; precipe

III.4

Amano atente silentu!

Asuero. Parolu!

Esthero. Ho Dio! Rebatu maltimon kaj krimon!
(men sagar)
Ĉi tuj Hebreoj (laŭ vi, detruindaj.
Kaj nur forĵetaĵoj de homoj), antaŭe
Posedis plej riĉajn propraĵojn kaj landon.
Ĉar ili adoris nur Dion prapatran,
Prosperis al ili daŭrigi feliĉon.
Sed Di' Plejpotenca sur Ter' kaj Ĉielo
Ne estas, ja, kiel malvere vi kredas;
Ĉar Li Eternulo, Li kreis Tutmondon,
Li plendojn aŭskultas de malfeliĉuloj,
Li juĝas homaron per leĝoj plej justaj,
Sur Trono timinda demandas Li reĝojn.
Laŭ Volo, facile Li povas ordoni
Teruran defalon de Regnoj plej firmaj....
Sed, Diojn aliajn Hebreoj adoris!...
Ve, tuj disĵetiĝis kaj gentoj kaj Reĝoj!
Malĝoja sklaveco sub Asirianoj
Fariĝis justpuno pro tia forlaso!

Sed Di', por rebati al niaj venkintoj,
Ĕ antaŭ naskiĝ' de Ciruso, elektis
Lin, nomis lin, kaj lin promesis al mondo,
Lin kreis, mizige lin armis por rompi
Fierajn remparojn kaj ferajn pordegojn,
Lin gloze riĉigis de Reĝoj malpiaj
Al Kiuj Li venĝis pro Templ' detruita.
Babel' superpagis pro niaj mizeroj;
Ciruso venkinto redankis al Dio,
Pacigis kun nia propol', nin rajtigis
Al nia Leĝaro, al festoj por Dio.
Ĝis Templo starigis el siaj ruinoj .....
Sed, filo malsaĝa, la heredintulo
De tiu ĉi Reĝo prudenta, cesigis
Laborojn por Templo! Ve, niaj doloroj
Ne tuŝis lin!... Di' senidaran lin lasis,
Detruis lin mem, kaj vin metis sur Tronon.
Ni multe esperis pro via grandtioro...
«Jen, Dio Kompatis pri gent' malfeliĉa -
-Ni diris - ĉar Reĝo justanne vin regas!»

De nia noviprinco ni kantis indulgon;
Pro ĝojo, Hebreoj dankkadis Ĉielon.
Ho Dio! Ĉu ĉiam malbonaj strirtoj
Malprave konsilos la princojn plej dolĉajn,
Kaj tiel malhelpos publikan feliĉon?
El fundo de Trraco, kruela barbaro
Alvenis ĉi tien alporti parforton....
Ministr'... malamiko al via potenco....

Amano Al via potenc'!... Mi?... Ĉielo!... Ĉu povos
Vi kredi?... Mi kies nur celo kaj Dio'....

Asuero Vi
Silentu! Sentima! Vi, spite mi, vočus?

Esthero Ĵus montris sin la malamiko kruela!
Li tiu ministro perfida, malpia,
Li, al vi, ŝajnigas fervoron malveran
Li, kontraŭ vi, vian animon incitis!....
Ho Dio, ĉu alia ol Scito sentkora
Kapablus konsili por tiaj sangverŝoj?
Ve! Ĉie samtempe l'ordono terura
Elirus, mortigoj mirigos Tutmondon!

III.4.

Ĝi vidos, en nom' de plej justa el princoj,
Ke Regnon perfortas perfida fremdulo,
Kaj ĉe en palaco, pro lia vengemo,
La sango de l'Viaj elŝprucas ĝis vin mem!
Pro kio li tiel malamas Hebreojn?
Ĉu ili inside ribelis? Ĉu ili
Kun la malamikoj kunigis? Ĉu sklavoj
Jam montris obeon pli plenan, ol ili
Glozantaj sub jugo la Volon de Dio?
En tempo mem, kiam vi al malamiko
Forlasis nacion sen ia espero,
Ĝi preĝis al Dio, Li gardu vin vivan,
Li de malbonuloj ŝaltigu atencojn,
Kaj vian potencon Li zorge protektu.
Ne dubu pri tio, ke Reĝo, Li helpis
Vin kontraŭ Partianoj kaj kontraŭ Indianoj,
Li antaŭ vi Scitojn forpelis, grandigis
Tramaroj vastecon de Viaj landlimoj;
Li Mem al Hebreo malkovris projekton
De du perfiduloj jam proksaj vin frapi....

III.4

Ve! Tiu hebreo, li, mia zorginto...

Asuero Mardoko?

Esthero Li sola en la familio
Postvivis. Li estas la frat' de la paĉjo,
Idar' defalinta de sang' de Davido.
Ĉar li abomenas Amalekidaron,
La rason, de Dio Mem, plej malbenitan,
Neniam li antaŭ Aman' genufleksis,
Nek donis honorojn nur al vi ŝuldatajn.
El tio devenas ĉi tiu malamo
Kaj Kontraŭ Hebreoj Kaj Kontraŭ Mardoko.
Jen estas, Ho Reĝo, la Kaŭz' de l'inspiroj.
Senfrukte Mardoko ricevis honorojn;
Aman' ĵus ordonis prepari, ĉe pordo
De sia palac', pendigilon hontigan ....
Post tiu ĉi hor', maljunulon ĉi noblan
Li prenos for reĝa palaco, vestatan
Per via mantelo, kaj tuj lin pendigos!...

Asuero Ho! Kiel terure mi ĵus elreviĝis!...
Kolero kaj h[illegible] min trafas en koro!...

III.5.

Ve! oni min trompis! Ĉiel', min Konsilu!..
Dum unu momento mi sola pripensu!..
Alvoku Mardokon... lin ankaŭ mi aŭdu.

(Asuero foriras.)

Hebreino Ho Dio! Ke Vero lumigu al Reĝo!

Sceno 5.

Esthero Amano Lizo Ĥoro

Amano Mi povas nur miri, ĉar la malamikoj
(al Esthero) De raso Hebrea perfide min trompis!
Ĉielo, Plejsupra Potenco min juĝu!
Se volis mi ilin detrui, mi kredis,
Ke vin mem mi tiel defendas! Sed de nun,
Princin' mi vin helpos por ilin protekti.
Vi vidas, ke Reĝ' ŝanceliĝas ankoraŭ;
Mi scias lin puŝi antaŭen, haltigi;
Mi faras, laŭ volo, malpacon aŭ pacon.
Ho, jam nun mi volas protekti Hebreojn.
Hodiaŭ mi mem al vi ĵuras pri tio.
Parolu... per glav' malamikoj frapotaj
Elpagos maljuston de mia eraro!

Al Kiuj mi venĝos vin?

Esthero. Foz!.. Perfidulo!...
Min lasu!... Hebreoj esperas neniom
De vi, malbonulo malestimeginda!...
Jen Dio. Li venĝos senkulpajn, Li pretas
Pozjuĝi vin! Tago poz puno ĵus venis!
Tremegu! Nun, via Potenco finiĝis!

Amano. Jes, vere! Ĉi Dio... Li Dio timinda!...
Sed, ĉu Li ordonas malamon senfinan?...
Ho devo fatala!... Ho pleja hontigo!...
Amani' senkompata, nun devas petegi!..
(Li flektas genuojn antaŭ Regino).
Pro sav'al Hebreoj! Pro via Kompato!
Pro ĉi maljunulo, honoro de l'gento!
Bonvolu pacigi la Reĝon timindan!
Min savu!... Amani' surgenue petegas!

Sceno 6

Asuero-Esthero-Amano-Lizo-Hozo-Gvardiistoj.

Asuero Ho! Ĉu l'perfidulo maltimus vin tuŝi?
Mensogo montriĝas surliaj okuloj.

III.7.

Kaj lia Konfuzo, post viaj Klarigoj,
Al mi memorigas pri liaj atencoj!
Ke tiu ĉi monstro tuj mortu; ĉe l'pordo
De lia palaco, anstataŭ Mardoko,
Li mem kvietigu Ĉielon kaj Teron,
Per morto vidita de gentoj venĝitaj!

(Gvardiistoj forprenas Amanon.)

Sceno 7.

Asuero-Esthero-Mardoko-Lizo-Ĥoro-

Asuero Feliĉa regato! Ĉielo vin amas!
(al Mardoko) Vi savis min, faris min ĝoja. Konsiloj
De malbonularc ne trafos plu Reĝon.
Nun mi elreviĝis; mi punis krimulon.
Vi, apud mi, sidu ĉe l'rango ŝuldata.
Mi al vi fordonas, riĉaĵojn, potencon
De tiu Amano; vi juste posedu
Honorojn, per kiuj maljuste li brilis.
Hodiaŭ mi tutliberigas Hebreojn.
Mi punos per mort'malamikojn de l'gento;
Samglora ĝi kiel la gento de Persoj.

Mi volas, ke ĉiuj respektu al Dio,
Li, kiun Esthero adoras. Konstruu
Denove la Templon, zeiru Sanktburbojn,
Ke via feliĉa idaro, perfestoj
Prikantu, de tiu ĉi tago, triumfon
Kaj glozon; ke via popolo, pozĉiam
Konservu memoron pri Reĝ' Asuero!

Sceno 8.

Asuero - Esthero - Mardoko - Asafo. Lizo - Ĥoro.

Asuero Nu! Kio Asafo?

Asafo Ho Reĝ', perfidulo
Ĝis mortis. Kolere popol' lin disŝiris.
Nun ovi fortrenas, kaj montras hontige
Restajojn sangrugajn de li! Korpo malnobla!...

Mardoko Ho Reĝo, ĉielo vin ĉiam favoru!
Sed helpu! Danĝer' al Hebreoj minacas!

Asuero Mi aŭdas, jes, tuj mi, per malaj ordonoj,
Malhelpos sangverŝojn de la malbonulo!

Esthero Ho Dio, per vojoj ne antaŭvideblaj,
Vi, Saĝo Eterna, konduktas homaron!

Sceno 9

Ĥoro.

Ĥoro (tuta) Dio protektas senkulpajn.
Kantu, ni laŭdu Dipovon.

Hebreino. Li, kontraŭ nin, vidis krimulojn sin ĵeti
Por elverŝi nian sangon;
Kaj kiel torento vastiĝi sur mondo!
De ĉielo, voĉo ekaŭdiĝis...
Fierulo renversiĝis,
Propraj sagoj lin trapikis!

Alia Malpiulo, potenca sur Tero,
Kiel cedr'al ĉielo direktis
Kapon maltimegan;
Li ŝajnis ordoni sur ĉiuj estaĵoj,
Li renversis siajn kontraŭulojn...
Mi paŝis nur, kaj li jam ne plu staradis!

Alia. Ne punas tuj, ofte, la Reĝoj; ĉar ili,
Malkapablaj por trompi,
Evitas malfacile
Mensogajn artifikojn,

III.9

Kaj Kozo nobela ne povas suspekti
Malvirton kaj malbonon
Algi tute fremdajn!

Alia. Kiel dangero ĉesis?

Alia. Per kia Potenco minacoj forflugis?

Ĥozo (tuta) Tion faris Esthero aminda!

Hebreino (sola) Je amo al Dio la Kozo plenigis!
Malgraŭ morto minacanta,
Kun fervoro ŝi sin montris;
Ŝi paroladis, Ĉielo aŭskultis!

Du Hebreinoj Esthero triumfis tur Persaj filinoj;
Naturo, Ĉielo ŝin ambaŭ beligis!

Unua Per ĉarmo senkulpa l'okuloj allogas,
Ĉu iam pli bela ol ŝi jam kronigis?

Alia Per ĉarmo de l'Kozo antaŭaŭ pli forta,
Ĉu iam pli bona ol ŝi jam kronigis?

Duope Esthero triumfis (K.t.p.)

Hebreino (sola) Dio ne plu kolera;
Ho ĝoju, Siono, elstaru de l'polvo,
Demetu vestajojn de malliberec',

Elmetu l'antikvan bzilon.
Ĉar voj'al Siono de nun malfermiĝas,
For Katenoj
Gentoj sklavaj
Tro elpelitaj!
Reiru kramontoj, maroj
Kune venu de Tut'universo!

Hebreino (sola) Mi revidos Kamparojn amatajn!
alia Mi pregãdos ĉe tombo j prapatraj!
Ĥoro (tuta) Reiru (k.t.p.)
Hebreino (sola) Refaru, refaru belegajn vestiblojn
De Templo, ĉar Dio nin tie atendas.
Ke ozoplej pura oznamu l'altaron;
El fundo de montoj eltiru marmoron;
Libani, vin seniguje cedroj antikvaj
Pastroj sanktaj pretigu kantadojn!
Alia Jen Dio revenas, ĉe ni Li logãdos!
Tero, kremu pro ĝojo kaj tirno!
Vi, antaŭ Majesto Sankta,
Ĉielo, malaltiĝu!

Alia Sinjoro plej bona! Obeo agrabla,
Dolĉega! Infanoj ĝi vin feliĉigos!
Karegaj, alkuru al Di' adorinda.
Plej belaj trezoroj ne estas ŝatindaj
Pli ol Korpleziro de Liaj Favoroj!

Alia Kun paco, pardono,
De Koro Lin forlasinta
Li volas reverenon;
Vin malfortajn senkulpigas,
Por nin serĉi eĉ rapidas;
Pri l'infan' de si naskita
Eĉ patrino malpli zorgas.
Ĉu iu, pli ol Li, meritas amegon?

Hebreinoj (Triopa) Favoris Li al ni per venko glorega.

Unu el triopo. Li elmontris Sian Glozon.

Triopa Ĉu iu, pli ol Li, meritas amegon?

Ĥoro (tuta) Dinomon ni dankU. Dinomon ni Kantu.
Prikantu ni Liajn Grandfarojn,
Pli longe ol Tempaj daŭroj,
Pli longe ol Eterneco!

Fino.

Takta Teksto

Muzikverko: Chœurs d'Esther.

A de Chaulieu 5 fs ĉe Lemoine 17 Rue Pigalle Paris

B de Moreau Schatté 3 fs ĉe Armand Colin 1. R. de Mézières Paris.

Akto I. Sceno 2.

A Fratin', kia voĉ' nin alvokas || Ĝin mi rekonas per ĉarma ekson' || Ĝi Reĝino - Kuru, fratinoj, o beu || Reĝino nin alvokas || Ni venu, ni aliru al Reĝino ||

B Kompatinda Sion', ve, perdis vi la gloron || Tut-univers' jam miris pri via bril' || Vi estas nur polvaĵo, Kaj pri via grandec' || Nun al ni restas nur malĝo-jega memoro || Siono ĝis Ĉiel' vi jam altigita || Nun ĝis Infer' vi malaltigita || Ho ĉiam mi restu sen voĉ' || Se miaj Kantoj doloran Korŝiron || Ĝis lasta elspiro, pri vi ne memorigas ||

A Ho bordo de Jordan', Ho feliĉa Kampar' || Sankta Mont', fruktiga Ho Valo || Vin cent mirakloj plej gloregas || El nia dolĉa patroland' || Ĉu estos ni ĉiam forpelitaj? || Ĉu mi vidos Sion', restarigi remparojn, || Kaj viajn turojn, je

belegaj tegmentoj ‖ Ĉu mi vidos el ĉiuflank' ‖
Popolojn, Kun ĝojkant', alkuri al la festoj? ‖

Sceno 5

Per ploroj Kaj ĝemad', Ho fidelaj fratinoj ‖ Ni ne
deteru nin je la larmoj ‖ Ni abrigardu al Sankta
Montaro ‖ El ĝi helpad' venos al Senkulpeĉ ‖ Ho mor-
tigaj tremigoj ‖ Pereas Israel', Ho ve mi plorad' ‖
Ĉu sub Ĉielo jam estis ‖ Tiel granda Kaŭzo por ĝemadi ‖
Kiel ŝafaro sen ĝin atakis lupoj ‖ Per ĝemad' nur
ni Kontraŭstaros ‖ Senkulpaj pagas ni pro pzapatraj
ofendoj ‖ Por kio servas, ve, vanaj ĉi bedaŭroj ‖ Prapa-
broj pekis jam, Prapatroj mortis nun ‖ Kaj ni devas
elpagi tiajn krimojn ‖ Ni pregas al Sinjoz', Li Di'
de Bataloj ‖ Ne, ne, Li neniel volos ‖ Ke tiel bucigu
Senkulpaj ‖ Minacas al ni danĝer' ‖ Pro Via Nom' Vi nin
savigu ‖ Kaj ne permesu, Ke Via Gloro ‖ Tru al fremdaj Dioj ‖

Akto II. Sceno 9

En moment' jen dolĉig' de animo malmola ‖
Nun leon', sen koler', estas ŝafid' kvieta ‖ Di', ria Di'
sen dub', inspiris al la koz' ‖ Ĉi emon al dolĉec' ‖

A Kiel rivereto, facile || obeas al la homo por ŝanĝo de la Kusujo || Kaj per la disverŝiĝ' de multegaj fluejoj || Fruktigas sur la Kamp' Kreskaĵarojn || Di' sur nia volad', Vi, Plej Supera Ordonant' || Al Kor' de Reĝ', Vi Komandas || Al Kor' de Reĝoj tiel Vi Komandas ||

B. Vivas kun ĝoj' prospera la popol' || Per la posed' de tiuj ĉi feliĉegoj || Pli da ĝoj' al pia popol' || Kiu al la Ĉiel' donis sian Konfidon || Por la plenum' de vantega dezir' || La malsaĝul' vane ĉiam Klopodas || Li trovas malĝojon || En la mez' de la ĝoj' ||

A Feliĉ' de malpiul', ĉiam sen trankvilec' || Li vagas laŭ la vol' de sentoj plej Konfuzaj || Serĉu ni, la feliĉecon || Nur en la pac' de Senkulpeco! ||

A Ho dolĉa pac' || Ankaŭ lumo eterna || Brilo ĉiam plej nova || Ho dolĉa pac' || Feliĉa Kor', Kiu amegas vin || Feliĉa Kor', Kiu ne perdas vin. ||

A La gloro de Krimul' ~~post~~ nur post moment' sen bril' || Nigra la tomb' lin por ĉiam surkovras || Ne fariĝis tiel por la timanta Vin || Li revivos, Ho Ti', brila pli ol Aŭroro.

Akto III. Sceno 3.

A Ho feliĉa popol', se ĝin Reĝo kun glor' || Regas per la potenc' de la fort' kaj de l'amo || Kun ĝoj popol', kun ĝoj' ankaŭ la Reĝo || Ho ripoz', kora tran-kvilec' || De granda feliĉo, ho plej daŭra cer-tigo || Kiam al Regnokondukant', al Regno-kondukant' || Por la regad' senĉese bonkonsilas || La justec' kune kun la ver' ||

B Reĝ', ĵetu for kalumnion,
Ĉar ĝi, per krima atenc',
En plej trankvila popol',
Pelas for la harmonion!
Ĝi volas tutsangavida
Trafi nur al senkulpul'
Helpu vi al forestant'
Kontraŭ perfidaj paroloj.

Do tiu monstro terura,
Estas malvera dolcec'.
Ĉar en anim' nur venĝem',
Ŝajna kompat' nur en buŝo.
Senĉesa trompo kaj lerta
Montras nur florojn sur voj',
Sekvas, kun vero, post ĝi,
Kora riproĉo senpova!

A Mi laŭdas Reĝon, se kun glor' || Per nevenkebla fort' li batalas tra mond' || Sed saĝa Reĝ, mal-amanta maljuston || Plej belo. don' al ni de Di' ||

A Ho ripoz' (K.t.p.)

Sceno 9

Dio senkulpulojn protektas
Ni kantu, prikantu Diporon,
Kun gõj', kun gõj', ni prikantu Diporon!

Esthero elvenkis filinon de Persuj'
La Natur', la Ĉiel' plej glore ŝin Beligis
Dio senkulpulojn (k.t.p.)

Vidas ni, en rigard', de dolĉec' allogon,
Ĉu bela pli ol ŝi antaŭe estis jam kronita?
Da allogo, en kor', multe pli trovigas
Ĉu bona pli ol ŝi antaŭe estis jam kronita?
Dio senkulpulojn (k.t.p.)

Kiel bona Sinjor', kaj agrabla Leĝaro;
Felic̃a l'infanar' obeanta al ĝi!
Plej riĉa posedaj' ne estas komparebla
Kun dolĉec' de plezur' alportita al kor',
Kiel bona Sinjor', kaj agrabla Leĝaro
Felic̃a l'infanar' obeanta al ĝi.
Dio senkulpulojn (k.t.p).

Ĥoro fina.

(malvolvita).

Nia danko al Dio! Nia Kanto al Dio!
Nia danko al Dio! Nia Kanto al Dio!
Ni prikantegu Liajn Farojn!
Pli longe ol Temp' Kaj Daŭrado!
Nia Kanto al Dio!
Nia danko al Dio! Nia Kanto al Dio!
Longe pli ol Eterneco!
Ni prikantegu Liajn Farojn!
Pli longe ol Tempi Kaj Daŭrado!
Nia Kanto al Dio!
Nia danko al Dio! Nia Kanto al Dio!
Nia danko al Dio! Nia Kanto al Dio!
Nia danko al Dio!
Longe pli ol Eterneco!
Nia danko al Dio! Nia Kanto al Dio!
Longe pli, Longe pli
ol Eterneco! ol Eterneco!

Fino.